



Turlanda Esperanta Kulturcentro
Domo de Asocioj
Gaston Pailhou Placo
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavtabelo	Paĝoj
Alex Schulman estas sveda verkisto, kiu aperigis sian 2an romanon kaj donas al vi la okazon konatiĝi kun la skandinavia literaturo pli kaj pli ŝatata en Francio. Por pli da detaloj pri la romano, bonvolu legi la apudan recenzon.	1 kaj 2
En tiu mallonga rakonto la interparolado inter la dungita murdisto kaj ties klientino havas nuancon da nigra humuro, kiu perfekte konvenas al la temo.	3 kaj 4 kaj 5
Nia klubo festis sian 120an jariĝon la 11an kaj 12an de oktobro 2025. Pierrette Formen, kiu estis la granda organizintino, raportas pri la evento kaj prezentas kelkajn fotojn.	6 kaj 7 kaj 8
La duan fojon ricevis ĉino la Pritzker Premion. Tiu artikolo prezentas la verkaron de Liu Jiakun per kelkaj linioj kaj fotoj.	8

Romano. Venonta haltejo de Alex Schulman aperas en poŝlibro.

La poŝeldono de la dua romano de Alex Schulman, Venonta haltejo, aperis en librovendejoj la lastan 6an de februaro. La libro rakontas la historion de misfunkcia familio, kies membroj faras la saman vojaĝon per trajno en malsamaj epokoj.

« Starante en la ombro de sia patro, sur la kajo, ŝi vidas lin faldi la palpebrojn en la matena malalta suno. Ŝi gvatas signojn de agaco en liaj rigardo kaj gestoj. Hodiaŭ ŝi estas aparte atenta, ĉar por ŝi ili faras tiun vojaĝon, kaj tial ŝi sentas sin ŝulda al li. Pro ŝi staras Paĉjo tie, sur tiu kajo, pro ŝi la varmo, pro ŝi la matena horo, la malfruo de la trajno, ŝi respondecas pri ĉio, kion li devas elteni ekde nun, kaj li silentas, nedeĉifrebla ».

Tiel komencas la sveda romano Venonta haltejo. Post la tre rimarkita La Postvivantoj (Les Survivants : 2020), la dua romano de Alex Schulman aperis en poŝformato ĉe 10/18 la 6an de februaro 2025. Sur tiu stacidoma kajo, la nepino, Harriet, estas atentega. Ŝi portas la fotografimaterialon de sia patro kaj ne aŭdacas demeti la tolsakon pro la timo kolerigi lin. Silentema patro, kies nura osbedo estas foti daŭre malnetajn aglojn – li povas neniam sufiĉe alproksimiĝi por sukcesinta alĝustigo. En la stacidomo de Stokholmo, ili pretiĝas entrainiĝi al Malma, urbeto situanta sude de la sveda ĉefurbo...

Instalita sur sia sidloko, la nepino lasas sian rigardon vagi tra la vitro : « *Ŝi rigardas tra la fenestro, la trajno rapidas sur altaj pontoj super la akvo kaj pro la rapideco la floroj formas bluan rubandon laŭ la fervojo* ».

En tiuj trajnoj interligantaj Stokholmon kun la urbeto Malma , la leganto sekvas la vojaĝon de kvin pasaĝeroj, ŝajne sen ligo unuj kun la aliaj.



Iompostiome li komprenas, ke iliaj historioj interplektiĝas laŭ la fluo de la malsamaj irvojoj. Inter ili, do, divorcinta patro akompanata de sia juna knabino. Kaj jarojn poste, Oskar kaj Harriet, paro kaptita en profunda geedza krizo. Fine, Yana, juna virino hantata de terura enigmo, realigos siavice multe pli malfrue tiun vojaĝon : ŝi provas determini la sorton de sia patrino malaperinta jarojn antaŭe, postkiam ŝi faris la saman vojiron.

Samtempe, kiam la pejzaĝo preterpasas, enteregitaĵoj memoroj reaperas rivelante pasintajn traŭmatojn kaj longe garditajn sekretojn. La trajno iĝas tiam metaforo de tempa vojaĝo, de la vojiro inter la naskiĝo kaj la morto, kie ĉiu haltejo senvualigas novan faceton de la roluloj kaj ties personan serĉadon. La temoj esploritaj de Schulman estas la


heredo, repuŝitaj memoroj kaj kompleksaj rilatoj, kiuj povas unuigi aŭ korŝiri familion. La rakonta konstruo, alternigante la malsamajn vidpunktojn kaj malsamajn epokojn, lerte ellaboras emocian puzlon, kiun Yana devos solvi por trovi specon de paco. Tra la paĝoj ĉiu peco trovas sian lokon por prilumi la centran misteron.

« Venonta haltejo » klare kaj delikatece aperas kiel verko, kiu demandas pri la memoro kaj la pezo de sekretoj formantaj niajn ekzistojn. La ekzistada soleco, la neebila komunikado, la nediritaĵoj, kiuj suferigas la korojn, la vortoj, kiuj disigas kiel haktranĉilo kaj kiujn oni bedaŭras... Ĉi tie la infero ne estas la aliaj... sed la membroj de la familio.

Estas io universa en tiu sveda historio. Silentoj, kiuj venenas ne estas loka specifeco. Vidataj el la trajno la sovaĝaj pejzaĝoj de la lando donas al la teksto sian specifecon. Ankaŭ tra ili transformas Yana sian serĉadon en inican vojaĝon : « *Tra la trajnfenestro, ŝi vidas Svedion preterpasi, lagojn kun glataj akvoj, kies surfaco sulkiĝas, kiam venteto tuŝetas ilin, kvazaŭ ili havus frostotremojn. Kial ŝi neniam vojaĝis ? Ŝi neniam forlasis sian apartamenton kaj ĉio, kion ŝi maltrafis preterpasas nun antaŭ ŝiaj okuloj.* »

Tiun recenzon de Samuel DELZIANI esperantigis Jean-Mary SIMONET

Venonta haltejo de Alex Schulman. Tradukita el la sveda de Anne Karila. 10/18. (2025) Prezo : 8,30 eŭroj.



La nigro tiel bone aspektas al vi

de

Marie-Hélène Moreau

La kolizio de la gutoj sur la metalo avertis ŝin, ke estus bone, se ŝi nun hejmenirus. La ekpluvego riskis pliiĝi.

Ŝia scivolemo estis tamen la plej forta.

— Ĉu mi povas starigi al vi demandon ?

— Evidente. Nepre necesas, ke la termoj de nia interkonsento estu tute klaraj.

— Ne, tio ne estas la temo... Pri tio ĉio estas klara. Vi tuj opinios min stulta, sed...

Kial vi estas vestita tutnigre ?

La viro sidanta sur la pasaĝera sidloko apud ŝi restis silenta. Li fikse rigardis la kapoton, el kiu fluetis pluvo.

Ho, mi ne devintus... Forgesu tion !

Li turnis sin al ŝi kaj fikse rigardadis ŝin.

— Tio estas stranga demando, sinjorino Rambert.

— Mi bedaŭras... Sed mi ne kutimas esti tiel... vespere, en veturilo, kun...



Li levis nigre gantitan manon por interrompi ŝin, evitigante al ŝi serĉadon de kvalifikaĵo.

— Tia afero postulas la plej grandan diskretecon, sinjorino Rambert.

— Jes, jes, mi komprenas ! Mia demando estas stulta...En la ideo, kiun mi faris al mi, tio okazus prefere en startrinkejo, ĉu vi vidas ? Startrinkejo kun mutaj homoj...

Li raŭke ridegis.

— Kaj vi surhavis nigrajn okulvitrojn, mi supozas ! Pffff...

Li skuis la kapon kaj ŝi ekvidis sur lia kolo longan cikatron. Ĝenate ŝi deturnis la rigardon.

— Ne,. KREDU min sinjorino Rambert, la plej sekura rimedo plu estas nokta renkonto sur izolita strato.

— Vi pravas. Finfine la profesiulo estas vi.

Ankaŭ ŝi ekridis. Pli por preni memfidan mienon ol pro reala envio, cetere, sed ŝajnis, ke li ŝatis. Ŝi malstreĉiĝis.

— Ĉu vi ĉiam nigre vestiĝas ?

Li ĵetis al ŝi rigardon, kiun ŝi ne kapablis interpreti. Eble ŝi ne devintus insisti.

— Ĉu vi kredos min, se mi diras al vi, ke mi ĉiam nigre vestiĝas, ĉar tio ŝajnas pli serioza ?

Ŝi ridetis sen respondi, ĉar ŝi ne sciis, ĉu li mokis ŝin aŭ ne. Je ŝia grandega malpezigo li diris plu.

— Morto estas serioza afero, kredu min. Vidu, enterigistoj estas ankaŭ nigre vestataj. Same kiel parokestroj...

— Mi konfesas, ke mi ne paraleligis ilin.

— Ni ĉiuj praktikas preskaŭ la saman metion. Oni okupiĝas pri la morto, sed oni ne intervenas en la sama momento.

— Fakte mi ne pensis pri tio.

Por ĉion diri ŝi estis iomete embarasata de tiuj filozofiaj konsideroj. Tial ŝi preferis reveni al pli praktikaj aferoj, pli kompreneblaj al ŝi.

— Mi kredis, ke tio estis pro la makuloj.

— Kiuj makuloj ?

— Nu, la sangaj makuloj ! Sur la nigro ili estas malpli videblaj. Tio verŝajne ofte okazas en via metio, mi supozas.

Li ĵetis al ŝi ofenditan rigardon.

— Vi faras al vi malĝustan ideon pri mia metio, sinjorino. Mi bonege laboras kaj ĉiam zorgas, ke ĉio estu purega post mia interveno.

— Iom kiel la farbistoj, sume !

— Mi ne scias... Mi neniam estis farbisto...

Kuntirante la brovojn li ŝajnis pripensi dum momento.

— ... Kaj mi ne certas, ke la ekzemplo estas ĝusta. Blanke vestataj estas la farbistoj, ĉu ne ?

— Jes. Cetere estas strange, kiam oni pensas pri tio...

Estas vere. Ŝi neniam pensis pri tio. Ŝi restis perpleksa, ĝis la viro interrompas ŝiajn pripensojn.

— Ne tiom stranga, ĉar ili ne bezonas kaŝi la makulojn.

— Sed mi kredis, ke vi ne faras makulojn ?

Li fulme rigardis ŝin, videble malmulte ŝatante ŝian humuron.

— Tio dependos de vi, sinjorino Rambert ! La maniero, kiel vi volos, ke mi procedu.

— Kial do, la maniero, kiel mi volos, ke vi procedu ? Vi estas la profesiulo, ĉu ne ?

— Iuj klientoj havas preferojn. La unuj volas, ke tio estu rapida kaj sendolora. La aliaj, malpli. La kliento estas reĝo !

Ŝi rigardis lin kun stuporo.

— Mi konfesas, ke mi ne pensis pri tio. Mi ne scias precize... Unuflanke mi dezirus la malplej rapidan procedon, pro tio, kion tiu aĉulo eltenigis al mi... Aliflanke tio ne estus konvena pro la mono, kiun li postlasos al mi..

— Sed atentu, sciu, ke mi laboras laŭ la tradicia maniero ! Strangolado, nuda glavo, dronado, ktp...

Neniaj ornamaĵoj.

— Kion vi volas diri per « ornamaĵoj » ?

— Torturoj, kriplig...

— Dio mia ! Kiel oni povas pensi pri tio ?

— Mi ja samopinias kiel vi, sinjorino Rambert. Sed estas tiel, nuntempe la metio malaperas. Mi laboras ankoraŭ laŭ la malnova maniero. Kun principoj. Do, kion oni faras ?

— Prijuĝu vi mem.

— Bonege. Tiukaze mi faros miamaniere. Kun garantio sen makuloj !

— Kaj... kiam tio okazos ?

— Profesia sekreto. Nur sciu, ke mi intervenas nur nokte.

Sinjorino Rambert pasigis la postajn tagojn en nepriskribebla ekscitostato. Dividata inter kulpeco kaj anticipa malpeziĝo, ŝi malsame rigardis sian edzon. Certe en tro insista maniero ĉar ankaŭ li ŝajnis malsame rigardi ŝin. Ŝi devis atenti, ke li ne dubu ion. Tial ŝi penis adopti sintenon konforman al la kutimo. Ĝis tiu oktobra vespero.

— Vi timigis min ! Mi kredis, ke ŝtelvagulo eniris en la ĝardenon .

— Mi bedaŭras, sinjorino Rambert. Mi ne volis timigi vin.

Ŝi faris geston por tuj ĉesigi liajn eskuzojn ridante pri sia kovardeco.

— Kun via nigra kostumo, nokte, oni ne vidas vin ! Nun mi pli bone komprenas la elekton de la koloro.

— Vi estas ege sagaca, sinjorino Rambert.

La duonombro ne ebligis al li vidi ŝin ruĝiĝi pro la komplimento.

— Sed kion vi faras tie noktomeze ? Ni tute ne antaŭvidis, ke tio okazos ĉi tie ! Ĉiamaniere mia edzo ankoraŭ ne hejmeniĝis.

— Ne maltrankviliĝu sinjorino Rambert. Mi ĉiam agas tiel, ke la komanditinto estu malproksima de la loko... ,kie la afero okazas.

— Bone. Nu kion vi faras ĉi tie ? Mi diris al vi, ke mia edzo restas malfrue ĉiuvespere en sia laborejo.

— Vi efektive donis al mi tiun valoran informon.

— Li verŝajne estas tie en tiu horo. Mi ankoraŭ vidis lin tie hodiaŭ posttagmeze.

— Ankaŭ mi.

Ŝi fikse rigardis lin, nekredema, antaŭ ol fine kompreni.

Dio mia ! Ĉu tio estas farita ? Mi ne povas kredi je tio...

Kun la vizaĝo kaŝita en siaj manoj ŝi ridis nun. La nervoj, certe.

Sinjorino Rambert...

Jes... Nu, sciu, ke mi havas plenan konfidon al vi, evidente. Sed vi komprenos, ke mi bezonas havi la konfirmon de lia morto, antaŭ ol pagi al vi la saldon. Des pli, ĉar vi diris al mi, ke vi intervenas nur nokte. Mi volas do certiĝi...

— Mi tute komprenas, sinjorino Rambert.

Ŝi malstreĉiĝis kaj sendis al li larĝan rideton.

— Ĉiuokaze dankon pro tio, ke vi avertis min ! Mi do diras al vi ĝis ege baldaŭ. Mi tuj pretiĝos. Ŝajnas, ke la nokto estos longa !

— Vi estas tre eleganta tiel, sinjorino Rambert. Tiu nigra noktoĉemizo rave sidas al vi.

— Dankon... Nu, bone ! Mi ne restigas vin. Preferinde estus, se oni ne vidus nin kune !

— Oni ne riskas esti vidataj, sinjorino Rambert. Vi mem diris tion, la nigro meze de la nokto...

Li alproksimiĝis al ŝi preskaŭ tuŝante ŝin.

— Se verdiri, mi pensis resti momenton ankoraŭ.

— Estas jam ege malfrue...

— La laboro, sinjorino Rambert, la laboro...

— Mi ne komprenas...

— Mi bedaŭras, sinjorino Rambert.

— Sed ni havis interkonsenton...

— Kiu tre ĉagrinis vian edzon... Li ofertis al mi la duoblon.

— Sed mi pagis al vi !

— Tio estas tre donacema el vi, sinjorino Rambert. Mi timas ne povi repagi vin pro via subita malapero.

Ni diru, ke via antaŭpago servos kiel pluso.

— Sed kion vi faras... !

— Nu, sinjorino Rambert, nu... Tio estos rapida. Kaj sen makuloj !

— Haltig...

— Kiel vi konstatas, via edzo elektis la strangolon.


— ...

— Malagrabla, mi konsentas. Sed purega.

— ...

— Mi rapidas, sinjorino Rambert, mi rapidas.

***Teksto esperantigita de
Jean-Mary Simonet***




Turlanda klubo kun granda sukceso festis sian 120-an jariĝon la 11-an kaj 12-an de oktobro 2025

Francaj gesamideanoj kaj neesperantistaj Turlandanoj respondis la inviton.

La klubo deziris festi la eventon kun ĉiuj, eĉ kun turlandanoj, kiuj ankoraŭ ne konatiĝis kun la Internacia Lingvo.

Historio, homaraj sciencoj, kulturo rendezvis en la "Spaco Jacques Villeret", sude de la urbo.



La aŭskultantaro montris grandan atenton kaj intereson. Ĝi aprecis la kvaliton kaj klerigecon de la prelegantoj, Renée Triolle kaj Pascal Dubourg Glatigny.



Estraro de Esperantista grupo de Segovio alportis donacon de sia urbo por la urbo Tours (ĝemeligitaj ekde 1972).


Delegitoj de la urbodomo de Tours faris donacon al nia klubo okaze de ĝia datereveno kaj proponis honorvinon.

Dank'al asocia manĝkamiono "La Marmite" parkata surloke, la ĉeestantoj havis bonan vespermanĝon el tutmonda kuirarto.

Vespere estis plezuro aŭskulti koncerton de Kjara, kiu ĉarmis nin per sia esprimplena muziko kaj siaj poeziaj vortoj.

Observante la publikon, ni vidis aŭskultantaron kvazaŭ sorĉitan.

Ĉiuj memoros ĉi-tiun intensan emocian momenton.



Tuj post paŭzo koncertis JoMo gvidante nin ĝis tute alia universo, kiu svingigis, kantigis kaj dancigis la publikon en freneza farandolo. Ĝoja etoso kaj varma amikeco inter generacioj kaj nacioj.

Dimanĉe matene, rondiro tra la historia urbo ebligis al la vizitantoj malkovri belajn kvartalojn sub belega suno. Bongusta bankedo atendis ilin en restoracio apud arbaro kaj poste, prelego de Renée Triolle allogis la ĉeestantojn, kiuj plie eksciis pri la inĝeniaj Fratoj Lumière.

Ĉiu foriris kun kapo plena de belaj kaj amikaj memoraĵoj.

**Raporto
verkita de Pierrette Formen**



ARKITEKTURO


Liu Jiakun, laŭreato de la Pritzker 2025



La prestiĝa Pritzker premio 2025 estis aljuĝita al la ĉina arkitekto Liu Jiakun. Li estis rekompensita pro ĉiuj laboroj ankrumitaj ĉe la sociaj kaj kulturaj realaĵoj de la nuna Ĉinio.

Agnoskita pro sia humana ekstraktado, la ĉina Liu Jiakun, kiu kreis Jiakun Architects en 1999 ricevis la Pritzker premion, kiun multaj rigardas kiel la arkitektan Nobelon.

Lia filozofio centriĝas sur la integrado de lokaj tradicioj kaj reciklitaj materialoj kiel liaj « renesancaj brikoj » eltiritaj el la ruinaĵoj de la tertremo de 2008. Inter liaj plej emblemaj realigaĵoj troviĝas



la kombinito **Okcidenta Vilaĝo en Chengdu** kaj la **muzeo de la Imperia Briko en Suzhou**. Lia tuta laboro, profunde ankrita en la ĉina kulturo, celas plibonigi la ĉiutagan vivon de la civitanoj, kreante publikajn spacojn inkluzivajn kaj daŭrajn. Liu Jiakun estas la dua ĉina arkitekto, kiu ricevis tiun distingaĵon post Wang Shu en 2012.
Artikolo eltirita de la revuo « Le Fil des ans » n° 298 Julio-Aŭgusto 2025 kaj esperantigita de Jeannine Layseman